# *Defendas Kubo bezonon pri nova internacia ekonomia ordo .*




?enevo, 25 jan (RHK) Dum kunsido de la komisiono pri scienco kaj teknologio por evoluo, de UN sesianta en tiu ?i svisa urbo, Kubo defendis la bezonon pri nova internacia ekonomia ordo, en kiu oni eliminu la monopolojn teknologiajn kaj  konajn.

Dum la kunsido, la estro pri ekonomiaj aferoj de la direkcio pri multflankaj aferoj de la ministerio pri eksteraj rilatoj, Maria del Carmen Herrera Caseiro, parolis pri la grandaj defioj alfrontataj de la sudaj landoj, kiuj ne disponas je la necesaj rimedoj por impulsi la starigon de la Agendo 2030 kaj la Celaro pri Da?rigebla Evoluo, raportas la informagentejo Prensa Latina.

Post prikonsideri ke la novigaj vidpunktoj ne sufi?as por impulsi la Agendon, ?i alvokis al funkciigo de nova ekonomia internacia ordo, kiu inkluzivas la eliminon de monopoloj teknologiaj kaj konaj.

La kuba diplomato defendis novan financan arkitekturon internacian kaj subtenis ke la evoluintaj landoj devas plenumi siajn devontigojn rilate oficialan asistadon por evoluigo.

Herrera Caseiro elstarigis la gravecon pri investado en kernaj sektoroj, inkluzive de eksterlandaj investoj rektaj en la evolulandoj kaj la bezonon impulsi la internacian kunlaboron.

Rilate al Kubo ?i emfazis la avancojn atingitajn en la scienco, la teknologio kaj novigoj, samkiel pri la pozitivaj rezultoj en la bioteknologio, agrikulturo kaj sano.

Kubo sukcesis tiujn atingojn malgra? la dama?oj provokitaj de la usona sie?o ekonomia altrudata de Usono dum pli ol 50 jaroj.

Kongrue al komuniko de la ambasado de Havano en ?enevo, la komisiono pri scienco kaj teknologio por evoluo de UN, sesiis kun la ?eesto de reprezentantoj de pluraj landoj.

En la kunsido oni pritraktis la novigajn fokusojn por subteni la starigon de la Agendo 2030 kaj la Celaro pri Da?rigebla Evoluo, samkiel la rolon de la scienco, la teknologio kaj la novigoj por garantii la nutran sekurecon ?is 2030.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/119447-defendas-kubo-bezonon-pri-nova-internacia-ekonomia-ordo

**Radio Habana Cuba**